

CNT**AIT****FAI**

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

INFORMA BULTENONACIA
KONFEDERACIO
DE L'LABOROAdr: ESPERANTO-FAKO, Av. Durruti 32-34
BARCELONO, HISPANIOIBERIA
ANARKISTA
FEDERACIO

II-a jaro

10 Aŭgusto 1937

Numero 3

LA MONDA KONFUZIĜO

(Fragmento de artikolo)

En Hispanio ni defendas nin inde kontraŭ la faŝismo. Oni alkondukis nin al milito. Krimemaj generalaĉoj disponigis sin al la faŝistaj potencoj. Pli ol 12 monatojn daŭras nia milito por liberiĝo k kvankam ni estas certaj rilate al la venko, povas pasi sufiĉa tempo ĝis kiam la malamiko estos frakasita komplete. En 1914 la germanoj perdis la batalon ĉe Marne, sed la milito daŭris ankoraŭ 4 jarojn. La italoj fiaskis la unuan batalon ĉe Guadalajara (ni ĝin gajnis), sed povas pasi multe da tempo ĝis la komplete triumfo.

La demokratiaj kapitalistoj ne estas pli noblaj ol la faŝistaj kapitalistoj. Ambaŭ volas profiti. K la milito estas bona negoco por ambaŭ. Ju pli daŭras la milito des pli ili gajnas. Kial la demokratiecaj ŝtatoj hezitas helpi al ni? Malantaŭ la registaroj ja estas la interesoj de la kapitalistoj, en la demokratioj, kiel en la diktaturoj. Provizaĵoj por Abisenio — bonege. Provizaĵoj por Hispanio — donaco de la ĉielo. Sed en dekduobligitaj kvantoj. La fabrikantoj de armiloj en la landoj demokratiecaj k en la faŝistaj interkompreniĝas reciproke. La negocoj estas negocoj. Delonge ni estus finigintaj nian militon venke, se oni ne estus bojkotintaj niajn petojn por armiloj.

La plilongiĝo de nia milito kunportas danĝeron pri la plifortiĝo de la antagonismo inter la aliaj landoj. Tion ekkomprenis ankaŭ Anglio, la insulo de la Eŭropa pacifismo. K ĝi komencis armigi sin. 270000000 sterlingojn voĉdonis la parlamento pri la aviadado, militŝiparo k armco. Tio estas preskaŭ la triono de la tuta ŝtatbudĝeto. K procediĝas al la realigo de gigantaj entreprenoj: novaj militŝipoj, municifabrikejoj aviadiloj, kanonoj ktp.

Milionoj da laboristoj de la tutmondo laboras ĉiutage en la militindustrio. Laboras por la milito, por la detruado, ne por pacifismaj valoroj. Ne por la bonstato de la popoloj. Ili konstruas militŝipojn por bombardadi sendefendajn urbojn, por faligi bombojn super virinoj k infanoj.

Jes, finalo de ĉi konfuziĝo estos serio da teruroj, antaŭ kiuj palas la fantaziaĵoj el la apokalipso.

La volumeno de la nuna monda konfuziĝo estas almenaŭ tiel granda kiel en 1929, antaŭ ol komenciĝis la lasta ekonomia krizo.

La senlaboreco ne malaperis. La mizero de la laboristaj amasoj ne malpliĝis senteble. La forto de la maŝino okupis tiun de la mano. La tagpagoj en kelkaj landoj plialtiĝis, sed samtempe plialtiĝis la prezoj de la produktaj. La tagpago do restis tute egala, ĉe multfoje estas pli malalta ol antaŭe. La ekonomia pliboniĝo estas nur ŝajna.

Ciuj ŝtatoj ellaboras programojn pri rearmigo. La fabrikantoj de armiloj volas akiri bonajn gajnojn. Ili tamen elvokis la spiritojn k kiel sorĉist-lernanto ne povas ekskomuniki ilin. La elretortiĝinta homonkulo de la militindustrio aliiĝas en furion, kiu estigas la mondan incendion.

La monda konfuziĝo estas endanĝeriga. Ĝi alkondukas nepre al haoso. La proletaro de la landoj regataj de la demokratioj k socialistoj kredas, ke laboras por la nova mondo, por la mondo de libero y socialismo. Envere koncernas al la profitoj de la fabrikantoj de la militmaterialo. Evidente ni estas alproksimiĝantaj kun gigantaj paŝoj al nova katastrofo.

En ĉi haoso la pesimistoj vidas la finon de la mondo. Sed kiu havas konfidon al la potenco de la popoloj, li trovas en ĝi la ekiĝon de la nova organizado de la mondo. La okazantaj bataloj estas teruraj k neeviteblaj. Tamen ni devas trapasi ĉi purgatorion. Oni devas detruai la kadukan mondon por ekzistigi la pacimperion.

A. SOUCHY



Ĉu...?

La Libera Instituto en Barcelono

Estis en la decidigaj tagoj de 19 de julio 1936. La perfido, kovita en la oficirejoj, inter la pokerludejoj k en la drinkejoj, eksplodis. Tuta Barcelono levigis. Sur la stratoj floris la barikadoj. Baldaŭ komenciĝis sangaj bataloj. La placo de Hispanio estis drama scenejo de unu el la plej gravaj. Tie la liberecanaj junuloj elpruvis sian heroismon. La malamiko restis premita k disbatita. Sed la batalo daŭris k estis necese organizi la venkon. Estis necesa unu ejo, kie centri la komandadon, deponi k ripari la armilojn k ĉeesti por unua helpo al la vunditoj. Resume unu ĝenerala kazerno.

Ĉirkaŭ la placo de Hispanio k en la vasta korso de Cortes elstaris belega domo. Malgranda ĝardeno servis por enirejo. La domo estis monahinejo k estis okupita de la faŝistoj. Niaj junuloj malfermis al si vojon per pafado. La konstruaĵo estis konkerita. Ĝi respondis al ĉiuj kondiĉoj. La Liberacana junularo jam havis sian ĝeneralan kazernon.

Foje venkite la ribelo en la ĉefurbo, elŝprucis novaj k malproksimaj batalkampoj. La aktualeco alprenis malsaman fizionomion. Komencite la milito, estis necese translokigi la operacion al la frontoj, dum en la ariergarde ekigis la sopirata agado pri la sociala rekonstruado. La konkeritaj faŝistaj fortikaĵoj transformiĝas en centroj de kulturo k bonfarado. La Liberecana Junularo ne hezitis. Ties ĝenerala kazerno estis transformita en instruada instituto, kie la filoj de la laboristoj akiras, liberaj de la antaŭjuĝoj, la konojn k la scion, neitajn de la kapitalismo. Elektiĝis komisiono pri la reformigo de la ejo, pri la selekto de la instruontaro ktp... Kelkajn monatojn intensa laboro k la instituto estis organizita.

La Libera Instituto, kiun patronas k subvencias la Liberecana Junularo, en Barcelono hodiaŭ estas modelo pri lerneja centro. Ni povis konstati tion dum la vizito. Enirinte ni trovis simpatian vidaĵon. En la ĝardeno je plena suno k aero vigla rondo da etuloj ĉirkaŭas instruanton. Estis okazanta klaso. Nia prezentiĝo ne estis antaŭavizita. La instruanto estis finanta ĉi momente sian eksplikadon. La etuloj blokis lin por demandi. Ni konstatas, ke inter la instruanto k la lernantoj estas malaperintaj la diferenco k la timo. Ĉis "ci". Nature ili ne estas pli ol kamaradoj.

Fininte la lecionon, la instruanto salutas nin k respondas ĝentile al niaj demandoj.

— Entute la lernantoj estas pli ol 500. La klasoj estas miksitaj —infanoj k infaninoj— k la instruado senpaga, ĉar ĉiuj elspezoj estas kompensataj de la Liberecana Junularo.

—Ni havas tri fundamentajn sekciojn: prepara aŭ elementa k tiuj pri unuagrada k duagrada instruado. Ankaŭ estas kelkaj noktaj klasoj pri laboristaj okupiĝoj.

—La interna organizado estas subtenata de plej absoluta demokratieco. Ĉiuj problemoj, kiuj estiĝas, estas solvataj pere de kunaj kunvenoj de lernantoj k instruantoj. Estas facile kompreneble, ke ĉi procedado ne necesigas iun direktoron.

—Pri multaj anekdotoj oni povas raporti, sed unu el ili estas speciale menciinda. Pro interna afero unu k-do volis foriri. Ekkonante tion, la etuloj senprokraste okazigis ĝeneralan strikon. Elstaris improvize kelkaj antaŭtempaj oratoroj. Okazis mitingoj k finfine triumfis la knabaro. La k-do konsentis resti k la paco restariĝis.

Akompanataj de alia instruanto ni trairas la oficejojn.

La klasĉambroj vastaj k ventolataj, la koridoroj lumaj, la dormoĉambroj plaĉaj k oportunaj. Ni supreniras fine al la biblioteko: la kunveno de la studemuloj. Infanoj k infaninoj kun rigardo fiksita al la libroj restas fremdaj al nia alveno. Ĉe la anguleto formas grupeton simpatia trio: 2 knabinoj k I junulo kun bruna haŭto k frizita hararo. Ilia intereso estis profunde absorbita de la pritraktata temo.

Ni ridetis k pensis, ke la nova generacio havos kiel batalilojn la librojn k kiel batalojn la bibliotekojn. Sed por atingi tion, estas necese frakasi la reakcian faŝismon, la centjaran malamikon de la libero k la kulturo...

A. E. MAMBRILLA.

LETERO

Pardonu, pardonu min, ama knabino,
ke tiel longege, longege, envere,
post nia disiĝo ankoraŭ mi cin ja
ne skribis almenaŭ avizan leteron.

Ci scias ja, ke mi kun verva sopiro,
amegis, adoris la Revolucion,
ke estis ĝi miaj song-revo, inspiro,
pro kiu mi pretis oferi ja ĉion.

K nune, veninte al ĝia kratero proksime,
ĝi min ebriigis magie per vino,
ekregis min ĝia beleco senlima,
fariĝis ĝi mia unua amatino.

Sed cin mi ne povas forgesi, knabino,
k malgraŭ distanco, landlimoj, montaroj
disigas k malproksimigas nun nin ja,
mi oftecin vidas en mia revaro.

K jene: ni sidas en laŭbo sur benko,
konversaciante pri jug, tiranio,
pri l'revolucio tutmonda k venka
k pri la estonta plijusta socio.

Ni ĵuris, flamentuziasmaj, elkore
cindriĝi fordone ĉe la barikadoj,
tutsame en Melburn, Tokio, Nov-Jorko,
Berlino, Londono aŭ en Leningrado.

Sed estis ci tamen ankoraŭ tre juna,
impete vivplena kun belo floranta,
k mi ja ne volis, amante cin, pune
mort trafu cin en la batalo bolanta...

Nun eble en cia eta florigardeno
ci reve bukedas siringon, lilion...
Ja ankaŭ tra nia land, nun tristĉagrena,
eksonos baldaŭe kant revolucia...

Pardonu, pardonu min, ama knabino,
ke tiel longege, longege, envere,
post nia disiĝo ankoraŭ mi cin ja
ne skribis almenaŭ avizan leteron.
Barcelono 1937

PARIO

NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAUVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:

K-dino A. BOIS	K-do Adr. PERSSON	K-do T. C. KLIJN
à MECÉ par VITRÉ	STADSHAGEN 13 - A	DAPPERSTR 123 - huis
(ILLE-et-VILAINE) FRANCIO	STOKHOLMO, SVEDIO	AMSTERDAMO, NEDERLANDO
Francoj, ne forgesu vialandan kotizejon!	Svedoj, kotizu al privialanda peranto	Nederlandanoj pagu lauvolan abonprezon al nia amsterdama peranto

La kotizontoj el la ceteraj landoj povas sendi abonprezon k monhelpon al nia k-dino A. BOIS, kiu estas samtempe nia internacia peranto
Anstataŭ sendi al ni responkuponojn, kotizu do rekte al niaj perantoj.

LA FAŜISMO CIVILIZAS

La bombardado de Guadalajara fare de la faŝistaj aviadiloj estis unu el la plej teruraj k sovaĝecaj, ĉar la bomboj estis direktitaj al la centroj, kie estas enloĝigitaj virinoj, infanoj k malsanuloj. Jen kiel priskribas ĝin ĉeestinto:

Ĉirkaŭ la 11 antaŭmeznokte 19 de julio la sirenoj vekigis la loĝantojn. Ne unuafoje oni estis bombardantaj la urbon.

La homamaso en la tumulto malsupreniris al la subterajoj, kaŝis sin en la rifuĝejojn. Pluraj iris al la kamparo.

La unua bombo bruliga falis en la Libera Lernejo. La flamoj supreniĝis la tegmentojn k videbligis aliajn konstruaĵojn inter ili la Infanazilo, konstruaĵo dividita en du departamentoj.

En unu departamento estis ĉirkaŭ 160 infanoj. En la alia estis 300 malsanuloj, infanoj k virinoj.

La aeroplanoj faligis la bombojn k utiligante la flamojn de la incendioj, mitralis tiujn, kiuj ne estis sin kaŝintaj en la rifuĝejoj. La spektaklo estis terura. La oficistoj, la purigistoj k la flegistinoj enviciĝis, malsuprenigante al la rifuĝejo la infanojn. La direktoro kuris tra la galerio, kuraĝigante la homojn k trankviligante la timegigitajn malsanulojn. Tamen la vekrioj estis laŭtigantaj.

Unu virino, kiu antaŭ kelkaj horoj estis naskinta, leviĝis kun sia ido k jam krozadis la galerion, kiam la bruligaj bomboj falis en la departamento de la Hospitalo.

En la Infan-azilo dum unu horo la infanoj k la malsanuloj estis malsuprenirantaj al la rifuĝejo. La direktoro malsupreniris k volis certigi, ke ĉiuj estis savitaj. Li registris ĉiujn dompartojn. La bomboj daŭre falis. La departamento de la Hospitalo ekardis k la incendio transiĝis la tutan konstruaĵon.

Kiam direktoro estis eniranta la rifuĝejon, falis granda bombo k li estis enterigita sub la detruaĵo. La rifuĝejo estis ŝtopita.

Kun kuraĝo, rapideco admirindaj la virinoj k la oficistaro de la laborejoj komencis savi la homojn, eligante ilin tra la breĉo, kiu restis ĉe la rifuĝejo.

La soldatoj, helpataj de kelkaj laboristoj, klopodis lokalizi la incendiojn k eviti la disvastiĝon al la najbaraj domoj. Nun la bomboj falis en la Azilo, kie estis ĉirkaŭ 250 personoj: infanoj, nenormaluloj, maljunuloj k malsunuloj de ĉiuj malsanoj. Ili estis flegataj de monahinoj k flegistinoj.

Unu monahino diris: Nu nun vi vidas, la aviadiloj de tiuj, kiuj sin nomas katolikoj detruis k incendiis al ni la azilon k nur pro miraklo ni povis savi la malsanulojn.

ĈI ANIMALO

Ĉi animalo...

Ĉi animalo grandmania Musolini, rigardas pejzaĝon.

La piramidoj.

La svinkso.

Egiptio.

K la animalo minacas la Svinkson k la piramidojn.

Musolini volas por si la tutan mondon.

K la tuta mondo falos sur lian kranion.

La piramidoj nomas lin kreteno.

Ankaŭ la svinkso.

La Universo forpuŝas lin.

Surkraĉas lin.

Rebatas lin.

La landlimo de Libio cerbu migas lin.

Ĝis Barka, tranĉeoj k fortikaĵoj.

En Barka du kontigentoj daŭre italaj trupoj.

En Tabruk, trupoj k aviadiloj.

Musolini, la kreteno, suferas la absceson de rabia frenezo.

K la rabiajn frenezulojn oni eliminis per pafado al la tempio. Aŭ al la koro.



Dum pli ol 4 horoj la faŝistaj aviadiloj 8 fojojn malŝarĝis siajn bombojn super la konstruaĵoj, seriante po 12 bombojn. Kelkaj falis en la najbaraj domoj, sed la celoj ĉiam estis La Lernejo, La infanejo, La azilo k la Ruĝkruco.

La faŝistaj aeroplanoj estis lokalizintaj la Azilon k faligis bombojn senĉese.

Homoj k virinoj, riskante sian vivon, helpis al la malsanuloj mane-ĉe mane. La incendioj reliefigis sur iliaj vizaĝoj malgraciigintaj la teruron. La bomboj daŭre falis, sed la maljunuloj k la malsanuloj estis savitaj.

* * *

KIEL LA FAŝISTOJ ESTIS VENKITAJ EN BARCELONO

Dum la nokto antaŭe la militista ribelo mi kun Durutti k Ascaso estis en la registara konsilantejo, atendante kapitanon Meana enmanigi al ni la armilojn, kiujn li estis promesinta al ni por povi batali kontraŭ la faŝismo, kiu, kiel ni jam sciis, intencis eliri surstraten por subpremi la polan liberon.

Meana estis promesinta al ni multon, sed por ne plenumi ĝin li evitis renkontiĝi kun ni, k ni ne vidis lin ĝis kiam ni akiris la certan komunikon, ke militistoj k faŝistoj jam estas elirintaj surstraten. Tiam li venis al ni k timigita diris: "Venu, ke mi donu al vi kelkajn pistolojn k eliru rapide, ĉar la militistoj jam estas sur la stratoj."

Mia indigno estis granda k se ne ekzistus konsideroj pri amikeco intima k politika, mi tuj estus mortiginta Meana'n, al kiu mi diris, "Vi estas kanajlo k senhontulo, mi rajtas mortigi vin kiel hundon, ĉar vi perdis al ni la nokton en la konsilantejo pro la promeso doni al ni armilojn por malakceli la eliron de la militistoj k vi ne plu aperis ĝis nun, dirante, ke la faŝistoj jam estas sur la stratoj k ke vi volas doni al ni kelkajn pistolojn, kiujn antaŭe vi forŝtelis el la armildeponejo de Sans, kiun (deponejon) ni volis konfiski, k avizante al vi, vi malpermesis, zorgigonte pri la armiloj la oficialajn faktorojn".

Meana ĉagrenita rediris nin: "Ni forgesu ĉi ĉion, prenu kion povas."

Ni ŝargis la aŭton per du dekduoj da pistoloj k rapide eliris al Regiona Komitato de C. N. T. kun pistoloj ŝargitaj, elmetitaj je la fenestroj, pretaj ne lasi nin, ke la faŝistoj kaptu nin vivaj. Ni iris al Pueblo Nuevo, nia granda laborista kvartalo k tie nia grupo per la armiloj, kiujn posedis, 1 mitralilo, 3 maŝinpafiloj, k 20 fusiloj "Weinchester" organizis en du ŝarĝaŭtomobiloj la ekspedicion por eliri batali kontraŭ la faŝismo.

Al ni aliĝis junulo malkvieta k nerva, sed tre kuraĝa, kiun ni ne konis k rezultis esti la socialista verkisto Angel Estivill. Li diris al ni, "Lasu min veni kun vi, ĉar vi estas la unikaj revoluciuloj en Barcelono." Ni alvenis al Rambla k distribuis la fortojn en la sekvanta formo:

Durruti kun 2 maŝinpafiloj k kompanio da soldatoj, kiuj transpasis al ni de Atarazanas, sub la ordono de la suboficiro Gordo k la sargento Manzano restis por defendi Ramblan.

Ascaso kun la suboficiro Gordo k alia grupo da soldatoj k kamaradoj iris trans la strato Conde de Asalto por bati Paralelon cele izoli la militistajn fortojn, forprenante al ili la plej gravan urban straton. Ĉi movado estis apogita de mi, kiu kun unu kaporalo, grupo da soldatoj, kun unu maŝinpafilo, la k-doĵ Ortiz, Cortes k alia multnombra grupo sekvis al Paralelo trans strato San Pablo.

La batalo estis streĉa k sanga. La militistoj estis plifortigintaj en la breĉo de San Pablo, kie ili estis instalintaj neston da maŝinpafiloj k dum duonhoron ni subtenis la batalon brusto ĉe brusto, ĝis ili retiris sin al domo najbara al "Moulin Rouge". Ascaso estis antaŭenirinta trans Paralelo k ni disvolvis decidigan batalon sur strato Tapias, liberigante la malliberulojn, kiuj estis en la malliberulinejo. Estas kurioze konstati, ke la malliberuloj ne volis eliri k estis necese elirigi ilin perforte.

Ni eliris malantaŭe Olympia fronte al "Moulin Rouge" k dum malpli ol duonhoron ni atingis retrigi sin la oficiojn k la soldatojn, povante tiele liberigi la sindikatejon

de la lignaĵistoj, la unika kiu falis en povo de la faŝistoj.

Tiel finiĝis la plej grava bataloperacio, ĉar barante Paralelo'n, la militistoj irantaj el la kazerno de Sans k Hospitalet restis izolitaj de la centraj faŝistaj armeoj, troviĝantaj en Atarazanas, Dependencias Militares, Aduana k Capitania General.

Iom post iom ni konkeris Ronda'n k placon de la Universitato, lasante post ni amason da kadavroj, ĉiujn kamaradojn, kiuj falis antaŭ la faŝistaj kugloj. Dufoje la faŝistoj parapetitaj en restoracio "Patria" lasis nin sen homo ĉe la maŝinpafilo, kiun ni estis instalintaj kontraŭe al ili. Fine ni povis trapasi k liberigite la placo de Universitato, trans Pelayo'n ni penetris al Rambla, sekvante nin vera kolono da laboristoj, arniĝintaj per la armiloj, forprenitaj al la faŝistoj.

Nia alveno al Rambla de Santa Monika prezentis gravan refortigon al Durruti k tiuj, kiuj estis batalantaj kontraŭ Atarazanas. Per nia maŝinpafilo k la forprenitaj al la malamiko ni iniciatis furiozan atakon super la antikva kazerno, kiu daŭris ĝis la urbo restis en mallumo.

Ascaso k mi pasigis la nokton kune maldormante kun niaj kamaradoj, gardostarante por malhelpi al la malamiko surprizi nin per subita atako. Frumatene, malfortigintaj pro laciĝo (5 noktojn ni ne dormis) ni pensis kuŝigi nin kelkajn horojn. Mi ne rememoras kie, sed ni trovis ĉirkaŭ "Buena Sombra" hotelon, destinitan por amaventuro frivola. Ni iris tien k vidante, ke al nia alvoko ne respondis iu, ni rompis la vitrojn de la pordo k suprenirinte, antaŭ la ĉambroj destinitaj por malkara amo al ni ekŝajnis, ne inde por revoluciuloj dormi en ili k forlasante nian decidon, ni eliris denove surstraten por rezisti en nia devo, kiu ne estis alia ol sekvi gajnante.

Ĉe tagiĝo komenciĝis la atako kontraŭ Atarazanas, batalo longa k kruela. Ni antaŭeniradis paŝon post paŝo. Leviĝis barikadoj dumetraj, falante tamen multaj kamaradoj. Laboristoj k gvardianoj, kiuj batalis frate kun ni. Fine ni decidiĝis jeti nin al la solidaj konstruaĵoj, en kiuj ŝirmiĝis militistoj k faŝistoj. La atako estis nopriskribebla. Kun malkovritaj brustoj ni atingis al la muroj de la kazerno Atarazanas. Ascaso, apude de mi, en Puerta de Santa Madrona, serĉis ŝirmi sin malantaŭ ŝarĝaŭtomobilo, sed ĉio estis malkovrita k batata de la pafado de Atarazanas. En la momento dum mi estis ŝarganta la kartoĉujon de mia maŝinpafilo, mi vidis, ke Ascaso surgenue malantaŭ la ŝarĝaŭtomobilo intencis ŝargi pli rapide sian fusilon, sed subite eksvingis brakojn en la aero k fulme falis surteren en stato, kiu ne dubigis pri lia morto. Mi volis alkuri por helpi al li, sed Baron k Coroll kun aliaj kamaradoj malpermesis, detenante min forte k devigante min sekvi malantaŭ la palisaro, pafante kontraŭ al la fenestroj de Atarazanas, kiuj estis 5 metrojn de ni.

Ekkoninte pri la morto de Ascaso neniel defalis la kuraĝo de la laboristoj. Rekomenciĝis freneza k neegala atako ĝis kiam fine la blankaj tukoj, flirtigitaj de la militistoj k la faŝistoj indikis al ni la venkon de la proletaron.

GARCIA OLIVER

Ne ekzistas demokrateca diktaturo. Ĉiu diktaturo lau sia naturo estas tirania, ĉar por ekzistigi sin ĝi alkuras al teroro k apogas sin sur la perforto.

FAŝISTAJ KRIMOJ

Sevilla. Julio. Ekde certa tempo konstatigas forkuro de multnombraj virinoj, apartenantaj al diversaj socitavoloj, kiuj forkuras el la urboj Cadiz, Kordobo k el aliaj urboj k vilaĝoj de la ceteraj provincoj, kie kun la tuta indeferenteco de la faŝistaj aŭtoritatoj ili estas perfortataj ĉiuhore de la dungitoj de Hitler k Musolini, kiuj absolutaj estroj en la priparolataj zonoj, procedadas kiel en konkeritaj kolonioj.

La senlima serio da perfortoj, torturoj, malbonaj traktadoj k atencoj kontraŭ la honoro de la virinoj estigis grandan indignon k neniu povas ekkompreni, kiel la faŝistaj aŭtoritatoj atingis al tiaj malnobleco k perversemo, neprotestante la indeco de hispanoj k patroj, fratoj k edzoj kontraŭ tia senhonteco. La malmoraligo disvastiĝas timige k la popolanoj suferas la fiagojn de la invadantoj, kiuj ne priatentas eĉ la sanktecon de la hejmo.

Antaŭ kelkaj tagoj en la parko de Maria Luisa promenadis komandanto k kapitano de la faŝista armeo, akompanataj de siaj edzinoj. Pluraj germanaj soldatoj intermiksiĝis kun la geedzoj k rigardis volupteme la sinjorinojn. Unu el la soldatoj, pli decidiĝema ol siaj kunuloj, alproksimiĝis al la du virinoj k direktis al ili lascivajn frazojn... La komandanto k la kapitano antaŭ tia konduto mortigis la soldaton.

La kuriozeco de ĉi okazo tamen estas, ke ambaŭ oficiroj estis detenitaj post duonhoro, submetitaj al mallongiga juĝproceduro k mort pafitaj la sekvintan tagon por kontentigi la rigoran postulon de la supera germana komando.

La pasintan semajnon gvardianoj de Asalto devis eliri al Carmona, kie maŭra sargento penetris frumatene en gastejon, troviĝantan en la ĉirkaŭaĵo, k post kiam li murdis la geedzojn-gastejestrojn, misuzis mallerte la filinon de la viktimoj, kiu estis 11 jarulino...

La kampanoj, ekkonante pri tio, leviĝis k la aŭtoro de la krimo devis rifuĝi en la kazernon de la falangistoj.

K la maŭro nun estas libera, nepunite de la aŭtoritatoj pri lia "heroaĵo".

Oni ekkonis ankaŭ, ke grupo da germanoj, kiuj troviĝis je ripozo en Ecija, sciigante, ke en la malliberejo troviĝas detenitaj 11 knabinoj akuzitaj de la falangistoj pro simpatio al la Respubliko, prezentigis nokte en la malliberejo, proprigis al si la malliberulinojn k seksperfortis ilin, baltante ilin poste barbarece por promeniĝi ilin tra la urbeto tutenudaj.

Ekde pli ol unu monato la teroro en Sevilla plifortiĝis. Nun ne nur viroj estas tiuj, kiuj troviĝas dispecigitaj kugle en la fosaĵoj sur la vojo de Dos Hermanas... Dumtage aperas korppartoj de murditaj inoj. La korpoj de ĉiuj virinoj, kiuj estis detenitaj. La detaloj pri ĉi nova krimo estigis profundan indignon. Oni ekscias, ke italoj k germanoj, akompanataj oftege de falangistaj fraŭloj, alkuris ĉiun nokton al la malliberejo en Sevilla k devigas la oficistojn per pistolo en mano liveri al ili difinitan numeron da detenitinoj. Per puŝoj k batoj ili venigas ilin al la gastejoj sur la vojo al Kordobo, malrespektegas ilin ĝis satigi siajn bestecajn apetitojn k poste por ne konfesi sian martirecon ili mortigas ilin en la ĉirkaŭaĵoj. Pli ol du centoj da inoj pereis tiel terure. Ĉio restas senpuna. La perfidaj generaloj, krom ke forvendas al la Hitler k Musolini partojn de Hispanio, konsentas kun lakea gesto, ke oni malrespektegu la honoron de la hispana virino. K la diverslandaj faŝistaj gazetoj nomas ilin "naciistoj". Kiel ŝarkasme k ironie sonas tio!

J.

ATENTU KORESPONDEMULOJ!

KORESPONDENCA CENTRO INTERNACIA, Helmerstraat, 22, Amsterdamo, havigas ĉiuspecajn korespondadresojn al la ĉiulandaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Petu detalojn.

UNU EKSPOZICIO



Parto de la ekspozicio, kiun arangis niaj palestinaj kamaradoj per materialo, kiun ni sendis al ili.

NIA HUMORO

DON JUAN K SINJOR BENITO

—Ĉu eblas?

—Eniru!

Eniras la oficejon de Duce sinjoro elegante vestita, kalva k kun agla nazo. Li alpaŝas al Musolini por premi lian manon, sed li ne atingas sian strebon. Kiam li etendas manon al Duce, la lasta levas supren la manon k la sinjoro elegante vestita, kalva k kun agla nazo restas kun trompsurprizo. Neniam ja li havis similan okazon. Krome neniam li estis vizitinta Ducen.

—Kiu vi estas?

—Juan March... la (li volis diri kontrabandisto, sed rememoras, ke nun ne estas tia) delegito de generalo Queipo de Llano, estro de la naciistaj fortoj ĉe la Sudfronto.

—Al mi estas agrable konatiĝi kun vi.

Ripetiĝas la sama ceremonio. La sinjoro elegante vestita, kalva k kun agla nazo etendas manon al Duce, k la lasta suprenlevas la manon k la dua restas kun alia trompsurprizo. Unu el ĉi paro da trompsurprizoj March enpoŝigas kiel rememoraĵo pri sia intervidiĝo kun Musolini.

Musolini trafoliumas notlibreton, en kiu estas enskribitaj multaj nomoj. Li serĉas unu nomon k laŭ gesto, kiun faras, ŝajnas, ke li ne trovas ĝin. Li ne trovis ĝin. Tiam li turnas sin al la vizitanto dirante:

—Vi estas mensogulo, vi estas mistifikulo, vi estas senhontulo, vi estas...

—Nu ne ŝercu. Mi estas delegito de Queipo de Llano, estro de la naciistaj fortoj ĉe la Sudfronto.

—Mi delegis neniun generalon nomitan Queipo de Llano por komandi la operaciojn ĉe la Sudfronto...

Juan March, ruzulo sperta, ekkomprenas la okazantan. La sekretario forgesis diri al Duce, ke en Hispanio estis generalo, kiu nomiĝis Queipo de Llano...

—Finfine kion vi volas? Diru pli rapide, ĉar estas la kvina posttagmezo k mi devas ĉeesti 8 defiladojn, prononci 3 paroladojn pacifistajn, provi 4 novajn uniformojn...

—Jam finiĝis la lasta forsendaĵo da volontuloj, kiujn vi veturigis al ni k mi volus, ke...

—Mi komprenas, mi komprenas. Vi volas de mi forsendi al vi pli da...

Sonoras sonorilo. Eniras sekretario k fotografisto. Musolini iĝas pli serioza laŭkutime k diras al ili.

—Ĉiuj jurnalistoj morgaŭ diskonigu deklarojn de Duce, dironte, ke mi estas preta retiri la italajn volontulojn, kiuj militas en Hispanio.

RECENZEJO

LA LASTA POEMO de Jaume Grau Casas, 28 paĝa, Barcelono, 1936.

Estas nedubeble, ke la konsiderindeco de la pritraktota temo kondiĉas grandgrade la literaturan valoron de la verkaĵo. Tio validas des pli pri la esperantistaj verkistoj, kiuj ne devas ŝarĝi la Esperantan literaturon per balastajoj. K ŝajnas al ni, ke ankaŭ Casas forgesas kelkiam ĉi elementan regulon. Kiel ja estas klarigebla la ĉeesto de la triviala poemo "Erotika Poemo" en la tiom bela poemaro?

"Vj donu vin al mi, ho belulino,
k mi ne volos plu alian ĝojon,
mi havu viajn brakojn kiel vojjon
k vian luman ventron por vojfino."

Cu la sindono de belulino povas esti supera ĝojo por ideo esperantisto k ŝia luma ventro—por lia vojfino?

Bontrafe k sence estas ekpensitaj la sonetoj "Al mia Patrino", "Al mia Fratino" k la versaĵoj "La lasta Poemo" k "Saluto de Gasto", dediĉita al la 8 SAT-kongreso. "Saluto de Gasto", estas vere literatura perlo. Sufiĉe profunda sociale, ĉe la aktualaj cirkonstancoj ĝi sonas ankoraŭ pli forte.

Saluton varman, el la kor,
al laborista mondkongreso,
al viaj penoj k labor
estu triumfo k sukceso.

Voĉ kuraĝiga jen por vi
de gast —ĉu tuj kunbatalonto?—
en nuna temp de dolor-kri,
de bruta fort, faŝisma honto.

Preferu — ruĝo de standard
flagranta kiel batalsigno,
pli ol perfido de ponard
mortiga por la homa digno.

Milfoje sanga mortbatal
por nask de justa homsocio,
antaŭ ol mort del ideal
ĉe l'burga ideologio.

Kun abomen mi krias: ŝi!
al hipokrito de la mondo.
Del Just fariĝi volas mi
jam kavaliro-vagabondo!

La ĝenerala impresio pri "La lasta Poemo" estas, ke Jaume Grau Casas posedas nepridubeblan talenton de poeto. Nur li ne foruzu ĝin pri nepritraktindaj k banalaj temoj.

PARIO

NEKROLOGO

Oni informis nin pri la morto de nia
k-dino MARGUERITE ASPES

de Foix-Ariège
Francio

Ŝi estis abonantino de "I. B.", pri kies disvastiĝo ŝi fervore klopodis. Krome ŝi helpis mone "I. B."
La familion ni sincere kondolencas.

Oni informis nin ankaŭ pri la morto de
K-do JASQUES MANDARD

de Bois
Francio

Li estis unu el la junaj k fervoraj funkciuloj de nia movado.
Ĉiaman memoron!

KRONIKO

Unu el la redaktoroj de la gazeto "La Libertad" starigis al nia k-dino Federika Montseny la sekvantajn demandojn:

—Kiel la iberaj anarkistoj akceptis ne nur la ideon pri la registara povo, sed —kio estas pli grava— ke ili mem partoprenas ĉi povon?

—Estis pro absoluta neceseco gajni la militon. Kiu povas egali kun ni pri la grandeco de la elmontrita oferemo? Antaŭ la oferejo de la venko ni oferis eĉ la proprajn ideojn. Ĉi-ĉio pro la libero.

—Se socialistoj k komunistoj kuniĝos en ununura partio, kiun formos ne nur la laboristoj socialistaj k komunistaj, sed plie tiuj de ĉiuj politikaj nuancoj el lojala Hispanio, ĉu oni ne povas diri, ke realiĝos la revolo pri la unueco de la hispana proletaro?

—Kiel oni povas formi ununuran partion, se ne priatentas nin?

—Kion vi opinias pri la eniro de la barbaroj en Bilbao?

—Ke la plej humana estis la detruado k la bruligado. La romantismo en tiaj timigaj danĝeroj ne estas nur malvirto, sed signifas havebligi al la malamiko rimedojn por esti pli kruela. Malgraŭ la kordoloro pro la detruado de la aminda urbo, sed mi je la nomo de mia virina koro estus detruinta la belegan urbon antaŭ ol forlasi ĝin.

* * *

Fondiĝis en Barcelono nova teatro nomita "Popola Teatro". Demandite de la ĵurnalistoj pri la celo de la "Popola Teatro", ĝia reĝisoro Guillermo Bosquets afable klarigis: "Nia celo estas akceli la renaskiĝon de la hispana teatro k doni al la venontaj poetoj koncepton pri sceno. Ni laboras ne nur por hodiaŭ: ni vidas laulonge de la procezo de la hispana revolucio la renaskiĝon de la teatro kiel esprimo de la grandaj socialaj fortoj, kiuj kanalizas ĉi periodon, k nia provo, sendube modesta hodiaŭ, tendencas akceli ĉi renaskiĝon. Ni juĝas, ke ĉi renaskiĝo venas por doni sian artan efikon al la vivo de la revoluciulaj amasoj, kiuj ne vane batalos."

Kiel direktoro de "Popola Teatro" estas la granda argentina revolucia verkisto Gonzales Pacheco:

19 de julio "Popola Teatro" prezentis kiel unua la dramon "Vi venkis, Monatkoff" de la rusa dramaturgo I. N. Steimberg, kiu estas ekskomisaro soveta k kunlaborinto de Lenin. Steimberg estas aŭtoro de serio da verkaĵoj, kiuj karakteriziĝas per siaj profundeco k ampleksa panoram-komplekso.

"Vi venkis, Monatkoff", plenumas la postulojn pri la moderna koncepto de la sociala arto. La grandeco de ĉi verko, laŭ diro de Pacheco mem, konsistas en tio, kion ĝi portas al la Arto, t. e. la konflikto inter la du ekstremoj de la homa sentemo: popolo k ŝtato, libero k aŭtoritato.

* * *

La 21 de julio C. N. T., F. A. I. k JJ. LL. okazigis en teatro Olympia grandiozan mitingon, kiun ĉeestis ĉirkaŭ

20000 laboristoj. Paroladis la k-doj Cortes, Fr. Isgleas, R. Liarte k Federika Montseny.

R. Liarte, kiu paroladis je la nomo de JJ. LL., diris interalie: "Dum la milito k la revolucio ni vidis iujn faktorojn, kiuj, kiam la Liberecana Junularo markis la padon de la sociala revolucio, vomis kontraŭ ni la kanajlaĵon de la kapitalismo nacia k internacia, sed ni finkonkludis el la procezo de nia batalo, ke la Liberecana Junularo akceptas nenies diktaturon".

K-dino Federika Montseny, parolante kiel ĉiam patose, konsilis: "Estas necesege, ke la popoloj kontraŭu energie ĉiujn aspirojn al diktaturo. Malgraŭ ke ĉiuj revolucioj finis en la manoj de iu Napoleono aŭ diktatoro, en Hispanio ni devas doni ekzemplon por ke nesurtroniĝu diktatoro... Ni estis absolutaj regantoj en Barcelono. Ni estus povintaj perfekte enkonduki la liberan komunismon. Sed ni subtenadis la antifaŝistan unuecon por montri al la mondo la principojn de libero k rajto. Tamen neniel ni permesos al iu ajn esti diktatoro super ni."

* * *

Grupo da Madridaj defendantoj sendis fratecan leteron al la ĉinoj defendantaj Pekin'on, instigante ilin al abnegacia defendo kontraŭ la faŝistaj banditoj de la japana imperialisismo. La letero finas: "Hispanio y Ĉinio por la libero de la popoloj! Ĉis la morto de la faŝismo!"

* * *

"El Darmstadt oni informis, ke la patroj de la soldatoj, kiujn Hitler sendis perforte al Hispanio, kunvenis por protestis antaŭ la naciŝocialistaj oficejoj pri la sendo de soldatoj al lando, kun kiu Germanio ne militas. La kunvenintoj manifestacie marŝis al la diritaj oficejoj. Post ili tamen eliris polico k estiĝis interpuŝiĝo. 40 el la manifestantoj estis detenitaj. Ĉi okazajo estigis grandan sensacion. Ĝin pligrandigas la informoj, kiuj jam ĉirkulas inter la popolo, pri la germana homperdoj en Hispanio. De buŝo al buŝo ĉirkulas la sciigoj pri la fiaskoj, kiujn suferas la germanaj fortoj, kiuj estis senditaj al Franko. Oni ekscias ankaŭ, ke unu aviadisto, sendita al Hispanio de la germana registaro, pereis en la bataalkampo k ke la kadavro alportita al Germanio estis enterigita antaŭ unu monato, k ke en Inffenhansen estis entombigitaj la kadavroj de du aliaj aviadistoj, kiuj ankaŭ pereis en Hispanio. Konfirmiĝas, ke la polico ordonis al la familianoj silenti pri tio.

* * *

La Bulgara Konfederacia de la Laboro aperigis manifeston kun titolo "La hispana revolucio k la bulgara laboristaro", el kiu ni eltiras la sekvantajn fragmentojn:

"Ekde unu jaro la internacia laboristaro sekvadas kun vigla atento la batalon de la hispana proletaro kontraŭ la faŝismo. Al la provo de generalo Franko por ŝtatperforto kontraŭstaris la energia rebato de la hispanaj laboristoj k kampanoj, kiuj diference de la germanaj estis edukitaj ne en la spirito de la balotado k obeemo al la "gvidantoj",

sed praktikadis por defendo de siaj interesoj la rektan revolucionan agadon. Komence preskaŭ senarmilaj, ili frakasis per siaj fera organiziteco k memdisciplino la dresitajn hordojn de la sovaĝaj maŭroj k legionanoj k per sia sango verkas la plej glorajn paĝojn en la batalo de la tutmonda proletaro, donante senekzemplan ekzemplon pri revolucia potenco”.

“Bulgaraj laboristoj k kamparanoj, ni unuigu nin, fondante komitatojn pri la defendo de la hispana revolucio. Agitadu la aŭtentikajn ideojn, kiuj donas kuragon al la hispana proletaro k sencigon de ĝia senekzempla heroismo! Ni fondu komitatojn. Ni akcelu la unuecigon de la proletaro kontraŭ unuiginta, kvankam ĉiame multfaceta kapitalismo. Vivu la hispana revolucio!”

* * *

Kiam la respublikaj trupanoj eniris en Brunete, ili kaptis du flegistinojn, apartenantajn al la jam malaperinta aristokrata kasto. Ili nomiĝas Maria Luisa k Maria Isabel k estas filinoj de eksmarkizo Marzal el Lanos. La trupanoj trovis ilin kaŝigintaj en pajlejo.

Demandite pri ties politika aparteno, ili konfesis sian faŝistinecon k ekster tio ili jesis korektan traktadon fare de la lojalaj trupanoj aldonante: “Ĉiuj ni ja estas hispanoj. Tamen kiam oni aludis al ilia la morton de la 27 lojalaj flegistinoj de la hospitaloj de Toledo k Talavera, kiuj estis murditaj apud la litoj mem, kiujn ili prizorgis, volante montri al ili la ekzistantan traktad-diferencon, ili devis rezigni la arogantecon, elmontritan komence.

* * *

“Informa Bulteno”, la Barcelonaj SAT-anoj k ILES ne povis esti reprezentitaj per sia delegoto k-do A. Mas dum la SAT-kongreso pro pripasportaj malhelpaĵoj. Ĉi cirkonstanco dolorigis nian koron, sed samtempe inspiris al ni pli da volo k kurago por la batalo kontraŭ la reakcio k faŝismo, ĉu kaŝa ĉu malkaŝa, k klopodigas nin ankoraŭ pli obstine por la triumfo de la sennaciismo, kies senlaca heroldo estas SAT.

LETERUJO

J. BOUT.—ROTTERDAMO. Jes, ni sendados al la indikita adreso 15 ekzemplerojn. Rilate al “Sindikalist”—bonvolu sendi ĝin al ni denove.

W. M. LINDER.—ROTTERDAMO. Sendita.

FOLKE ROSEN.—STOKHOLMO. La adresaro ricevita.

M. J. L. y HOUTERT.—ROTTERDAMO. Sendita.

WILLY GARDIEN.—ROTTERDAMO. Materialon por la ekspozicio ni jam sendis.

VITAL MONTULET.—LIEGE. Ni sendos. Proksimuma prezo du res. kup.

NILS HENRIKSSON.—KUNGSULT. Dankon pri la 5 svedaj kronoj, kiujn ni sisteme ricevus.

KARL VIGIER.—VALENCE D'AGEN. Ne, k-do, nin ankoraŭ ne trafis la senditaj res. kup.

K-DO KET.—GENT. Ricevita. Dankon. Ni jam sendis al via adreso pakajon da hispanlingvaj gazetoj por la rifuĝintoj.

LUDO KASTEL.—TOULOUSE. Via interesa letero ricevita. Dankon pro la prirespondekupona klarigo. Do ni povas utiligi ilin. La petataj numeroj jam senditaj. Escepte de n-o 26 k la eksterordinara, kiu estas elĉerpita. Korespondado kun faŝistaj regionoj kelkiam eblas escepte de Saragoso. Sed pri via k-do — nu ni faros la fareblan. Ni deziras al vi ĉion bonan dum la vojaĝo. Ĝis revido!

KRESENCIO GIL.—FRONTO DE ARAGÓN. La mono ricevita. Elkoran dankon!

A. DAMSTEC.—ROTTERDAMO. Dankon pri la 10 peseta donaco.

ADRIAN PERSSON.—STOKHOLMO. Via interesa letero ricevita. Elkoran dankon pri la konsilo. Al la novaj adresoj ni sendados la bultenon. Ni atendegas la promesitan artikolon. Transdonu nian revolucionan saluton al la k-doj.

ROBERTO BONELL.—LILLE. Jes, ni plue sendados ĝin. La petata numero—elĉerpita.

IBEN CARLSSON.—SVEDIO. Elkoran dankon pri la res. kup. Via samlandano Nils Lath jam estas sana k laboras en Aragona kolektivo. Lia adreso: Compañero sueco Nils Lath, Fabara (Zaragoza) Via Cerbere, Hispanio.

MALTE CARLSSON.—ABY. Dankon pri la res. kup. La antaŭe senditaj ankaŭ ricevita.

ME. DUFLET.—LILLE. Avizu nin pri la kiomo de la bezonataj numeroj de la gazetoj.

J. REHORTS.—ROTTERDAMO. Dankon pri la res. kup. Via k-do ricevados. “I. B.” La klarigo ne kontentiga. La vorto eble estas ĉehoslovaka sed ne nederlanda. Ni konigos al vi poste ĝian etimologian devenon.

MICUIERE PERE.—ICNY. Dankon pri la kamaradeca letero.

RESTITUTO ALBERO.—COCENTAINA. Kordanke ni ricevus la monon. La petatan kvanton da ekzempleroj ni sendados.

J. W.—FRANCIO. Via kortuŝa letero ricevita. Viaj prijuĝoj estas absolute pravaj. Senprokraste ni sendas al vi hispanlingvajn gazetojn por la rifuĝintoj k kompendion pri la hispana lingvo...

H. N.—BELGIO. Ni atendas definitivon avizon de la taĉmentestro pri la farto de via pri demandito. Ĉiokaze de post kontrolo de ni mem en la Barcelona statistikejo ni certigis, ke lia nomo ne figuras en la nomaro de la mortintoj.

A. ROIG.—FRONTO DE ARAGÓN. La letero ricevita. Jes, la tria numero estas presita ĉe JJLL-presejo. Ni atendas de vi baldaŭan raportajn pri la vivo de niaj milicanoj. Ĉion bonan!

SAT-ANO 50.—MONTREUIL. Ni kore dankas vin pri la res. kup. k pri la disvendado de la I. B. La enspezojn sendu al nia internacia adreso, indikita en ĉi numero de “I. B.”

Ni ricevis respondekuponojn ankaŭ de la jenaj ge k-do, al kiuj ni dankas: Alvar Tiling, Vasteras, W. Neuhaus, Malmo; M. de Jong, Roterdamo; Bonin—esperanto, Macheecoul; H. Siemen, Amsterdamo.

PRESSERVO DE ILES

Presejo „Liberecana Kulturo“
str. Salmeron 241, Barcelona